

Cherpillod la Franco

André Cherpillod. Espéranto, une valeur culturelle, L'; L' espéranto, une valeur pédagogique; Histoire de la littérature en langue internationale. La Blanchetière. Courgenard. 2005. 109 paĝoj. Prezo: 6.00 €

André Cherpillod. Espéranto, la plus facile des langues, L'. La Blanchetière. Courgenard. 2008. 49 paĝoj. Prezo: 4.80 €

Pri André Cherpillod ne estus konataj multaj biografiaj faktoj, se ne ekzistus lia mempriskribo en La Gazeto, n-ro 126/2006, kie li malkaŝis tre interesajn aspektojn de sia vivo. Tamen aliloke oni ekscias, ke li naskiĝis en 1930, estis fakinstruisto en mezgrada lernejo pri natursciencoj, emeritiĝis en 1990, loĝas en Courgenard (apud Le Mans en la franca departemento Sarthe), estas membro de la Akademio de Esperanto depost 1992 kaj ke li gajnis la unuan premion en la franca konkurso 'Dicos d'or' kaj ankaŭ la prestiĝan premion 'Granda Ĉampiono de la Diktaĵo de l'Amerikoj'. Temas pri internacia konkurso, okazanta ĉiujare en Kebekio (Kanado) kaj koncernanta la regadon de la (iom malfacila) franca ortografio, kiun dekmiloj da personoj partoprenas ĉiujare. Partoprenante en la konkurso de 1999, Cherpillod trapasis la konkurson kun brila rezulto, tiel ke li gajnis la unuan premion en la kategorio 'profesiaj senioroj A (franca – oficiala lingvo)'. Ĉi tiu gajno atestas la altnivelan kvalifikon de Cherpillod pri la franca ortografio. Nu finfine li ne vane legis la tutan Molieron kaj estas admiranto de la franca kiel unu el la plej gravaj kulturlingvoj de la mondo !

En Esperantujo Cherpillod estas konata pro multnombraj broŝuroj kaj prelegoj pri plej diversaj temoj, ne nur esperantaj, sed ankaŭ pri ekzotaĵoj kiel la galla lingvo, akada leksikono, volapuka vortaro, bibliaj aferoj, historio de la ĉifro, Hillel la Saĝulo, Solresol, Ido unu jarcenton poste, Zamenhof kaj judismo, kaj pro kelkaj beletraj tradukoj kiel Ĵana d'Arko ĉe la Ŝtiparo de Paul Claudel. Do eblas diri, ke la majstra aŭtodidakto kaj konvinkita senreligiulo Cherpillod, abiturientiĝante nur en la aĝo de 32 jaroj, kun siaj vastaj interesoj apartenas al la plej fruktodonaj Esperanto-verkistoj kaj do sendube povas esti konsiderata kiel unu el la plej kompetentaj, kvankam nur sur amatora nivelo. Frapa karakterizaĵo de la tekstoj de tiu granda lingvoŝatanto kaj serioza ortografiisto estas ekzemple lia pedanta konsidero de diverslingvaj transkribadoj, eĉ laŭ originala alfabeto, ĉu cirila, ĉu hebrea, ĉu araba, ĉu japana, ĉu hinda, ĉu akada, kio faras la konsultadon de liaj verkoj interesa kaj alloga. Por esperantologoj lia kompila laboro certe estas tre bonvena kaj estiminda.

En sia franclingva broŝuro de la jaro 2005, evidente direktata al ĵurnalistoj, kiuj asertas supraĵajn kaj nekorektajn aferojn, la aŭtoro enkonduke traktas la kontraŭdiran demandon de la artefariteco de Esperanto kaj emfazas, ke Esperanto ne estas artefarita. Prefere oni uzu alian terminologion kiel 'konstruita lingvo' aŭ 'planita lingvo', plej bone eble 'interetna lingvo'. Ĉiu lingvo do estas artefarita, ĉar laŭ la uzado de siaj parolantoj ĝi estis normita de gramatikistoj kaj ne inverse. Kaj li aldonas aron da ekzemploj por montri la diferencon inter 'natura' kaj 'artefarita'. Sekve eblas legi la klarigojn kial lingvo estas fenomeno grandparte natura kaj kial 'naturaj' lingvoj enhavas artefaritan parton. Do sen artefariteco preskaŭ nenio eblas, ĉar ĝi estas la „manifestiĝo mem de la homa aktiveco“. Kaj denove sekvas abundo de interesaj ekzemploj ĉefe ligitaj al la franca lingvo. Laŭ tiu tuta logiko Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj ceteraj, kiu krome ne estis farita de unusola homo, sed kiu evoluadis same kiel la aliaj lingvoj.

Por parolanto de la franca lingvo, kies ortografio estas ekstreme neracia, Esperanto povus esti alloga lingvo. Ĉi tiun temon Cherpillod traktas en la dua ĉapitro, kies enkonduka titolo estas strategie kaj propagande lerte elektita: „Esperanto ne estas artefarita, sed racia lingvo“, kaj kiel subtitolo „Internacia lingvo ne povas esti artefarita“. La hipotezata sukceso de Esperanto konsistas en tio, ke ĝiaj parolantoj trovis en ĝi dekomence elementojn, kiuj al ili estis konataj jam tra siaj gepatraj lingvoj. Se Esperanto konsistis nur el pure inventitaj vortoj, ĝia sukceso verŝajne estus malgranda aŭ nula (komparu kun Volapuko). Aliaj avantaĝoj de Esperanto estas laŭ la aŭtoro, ke ĝi estas nek latina, nek hindeŭropa kaj ke ĝi estas internacia.

Pro iuj menciitaj faktoroj kaj ĉar Esperanto fariĝis lingvo de la ĉiutaga vivo, la zamenhofa idiomato estiĝis kultura valoro, per kio en la tria ĉapitro Cherpillod tuŝas la tiklan diskuton ĉu lingvo havas aŭ estas kulturo, por veni al la aserto, ke la lingvaĵo estas la vehiklo de la kulturo, sed ĝi ne estas *la* kulturo en si mem. La kultureco de Esperanto konsistas inter alie en tio, ke ekzistas Esperanto-tradukoj de verkoj el diversaj nacilingvoj. Kaj krom kulturan valoron, Esperanto havas ankaŭ pedagogian valoron, por tio ke inter alie ĝi estas utila por la interkompreniĝo, estante praktika kaj ĉar ĝi riĉigas la intelekton, formante

ponton al aliaj lingvoj. Inter la argumentaro kompreneble ne povas manki la aserto pri la eksterordinara facileco de Esperanto, kiu jam preskaŭ fariĝis mito. Mi mem demandas min kial ĝuste tiom da francoj fuŝe parolas Esperanton (havante problemon ekzemple kun la akuzativo kaj la prononco), se Esperanto laŭdire, laŭ la 'oficiala' propagando, kiun Cherpillod praktikas, estas tiel facila? Ĉe Cherpillod bedaŭrinde mankas ajna diskuto pri tiu tikla temo, ĉar ĝi ne koincidas kun la bildo de la kvazaŭ absoluta 'perfekteco' de Esperanto.

Kvankam Cherpillod profiliĝas kiel ne malgranda majstro sur la kampo de la gramatiko, kiun li prezentas denove kun multaj ekzemploj en la kvina ĉapitro, la aglutineco de la lingvo Esperanto ĉe li finfine restas nur simpla aserto. Certe, la ege produktiva afiksa sistemo de Esperanto faras ĝin sendube ekstreme aglutineca ('malsanulejestrino' k.s.); sed necesus ankaŭ klare montri, kio distingas Esperanton ekzemple de la finna, estona, hungara aŭ turka lingvoj, kiuj estas konsiderataj de la lingvoscienco kiel 'klasikaj' ekzemploj de tiu lingva tipo. La sesa ĉapitro estas dediĉita al la poezieco de Esperanto – bone, ĉar preskaŭ neniuj inter la neesperantistoj kredas, ke tio povas ekzisti. La sepa ĉapitro estas konceptita kiel superrigardo pri la Esperanto-literaturo. En la plej lasta, oka ĉapitro, Cherpillod entreprenas specon de resumo: Konfesante, ke la diverseco de la lingvoj estas neanstataŭigebla riĉeco kaj ke la lingva unuigo estus kultura katastrofo, Esperanto signifas laŭ li respekton de la kulturo de ĉiu individuo, „pasporton por la demokratio“, finfine „malferman fenestron al la mondo“. Nu bone, kial do ne.

Lia kompletiga broŝuro de la jaro 2008 evidente celas pruvi la nekontesteblan facilecon de Esperanto, kompare kun ajnaj nacilingvoj, precipe la franca, kies gramatiko kaj ortografio estas aparte neraciaj, preskaŭ surrealaj. Kerna eldiro estas, ke en la lingvo Esperanto ne troviĝas la malfacilaĵoj, kiujn konas la nacilingvoj, ekzemple gramatika sekso, neregulaj verboj. Aperas ankaŭ la mito pri la facileco de Esperanto, kiu estas mezurebla laŭ daŭro de lernado. Eĉ se oni konsideras, ke Leo Tolstoj aŭ Umberto Eco dediĉis kelkajn horojn al la studado de Esperanto, tio ne signifas, ke ili kapablis flue paroli aŭ skribi en tiu lingvo. Male, la vero estas, ke ili tute ne parolis Esperanton. Do, por ke homo bone regu Esperanton, certe necesas pli da tempo, kaj la lingvotalento de lernanto certe ludas esencan rolon. Kaj kion signifas bone regi iun lingvon? Ĉu por tio necesas koni ĉiujn vortojn de PIV aŭ ĉu sufiĉas baza kono de Esperanto por gvidi meznivelan konversacion pri 'simpla', ĉiutaga temo, kiel en la kazo de la plimulto de la 'averaĝaj' Esperanto-parolantoj? Preskaŭ neniuj esperantistoj senerare praktikas ekzemple la ne/transitivecon de la verboj, la participojn kaj ties verbaspektoj aŭ la pronomojn lia/ŝia/sia. Pri la akuzativo, kiu indikas ĉu homo entute havas gramatikan senton, ni tute ne parolu. En grafikaĵo oni povas vidi, ke kompare kun nacilingvoj eblas pli rapide progresi kaj atingi kontentigan nivelon de Esperanto en baza kaj praktika konoj, dum konoj sur literatura nivelo aŭ perfekta ŝtupo jam estas pli malfacile atingeblaj. Kiel scienca pruvo estas menciita la kibernetikaj eksperimentoj de Paderborno. Cherpillod evidente celas subkomprenigi per iuj ekzemploj, ke Esperanto povus helpi al franclingvaj parolantoj solvi ties malfacilaĵojn kun la denaska lingvo. Sur p. 16 la aŭtoro tamen aludas, ke la akuzativo povus esti problemo por franclingvanoj. Kaj sur pluraj sekvaj paĝoj, sub la moto „Tre facile, ĉu ne? Jes, sed...“ Cherpillod detale klarigas esencajn gramatikajn diferencojn inter la franca lingvo kaj Esperanto, kiuj certe devus ŝoki aŭ frenezigi ĉiun francon, kiu volus okupiĝi pri ĉiuj tiuj lingvaj specifaĵoj. Do, per ĉiuj tiuj lingvaj ekzemploj Cherpillod certe sukcesis pruvi (kaj tio estis lia celo), ke Esperanto estas pli facila ol la franca, kaj verŝajne ol ajna nacilingvo. Sed ĉu francoj kaj alilingvanoj vere sukcesas profiti de tiu facileco, kiun Esperanto ofertas, estas alia demando. Konsiderante la ofte fuŝan lingvouzadon de partoprenantoj en Universala Kongreso, oni eĉ rajtas dubi, ĉu Esperanto estas facila lingvo. Teorie eble jes, praktike ŝajne malpli. Pri la embarasa lingvonivelo de tiel nomataj 'eternaj komencantoj' ni ne parolu.

La ĉefa merito de Cherpillod en tiuj du broŝuroj estas disponigi materialon utiligeblan kiel kontribuon por diskuti la demandon, ĉu Esperanto estas facile adoptebla aŭ ne far franclingvanoj. Mia ĉefa kritiko de la maniero de Cherpillod trakti la aferojn konsistas en tio, ke ĝenerale necesus esti iom pli kritika rilate certajn tradiciajn asertojn pri la 'avantaĝoj' de Esperanto, kiuj teorie ja verŝajne estas pravaj, sed iusence fariĝis parto de la esperanta profetologio, kiu evidente ne plu tiom efikas en la Esperanto-propagando.

Krom tio la grafika aranĝo de liaj memeldonitaj broŝuroj aspektas iom eksmode, alivorte: editorado en pli digna formato estus dezirinda.

© Andreas Künzli, aperis en *Esperanto* (UEA), januaro 2009 (ĉi tiu versio estis retralegita kaj ete korektita en aŭgusto 2015).

Ido centjara kaj daŭre ekzistanta

André Cherpillod. Ido, unu jarcenton poste. La Blanchetière. Courgenard. 2007. 47 paĝoj. Prezo: 5.10 €

Pri Ido oni denove parolas, ĉar pasis cent jarojn ekde ĝia publikigo. Estas klare, ke Ido ne ekzistus sen Esperanto, kaj ĝi verŝajne ankaŭ ne estus aperinta sen la puŝa (kaj evidente perfida) kontribuo de Louis de Beaufront (1855-1935), la mistera franca „markizo”, kies vivon oni konas nur konture (ĉar en 1871 malaperis lia originala naskiĝo-akto, kiu poste estis restarigita kun la nomo Chevreux, aperis duboj, ĉu en la kazoj de s-ro Chevreux kaj s-ro de Beaufront vere temas pri la samaj personoj). La veron pri la vivo de Chevreux-de Beaufront klopodis eltrovi jam Roland Jossinet (vd. *Franca Esperantisto*, junio 1998, p. 42-48) – ĉi tiu baza studo strange ne estas menciita de Cherpillod, sed supozeble li baziĝas, ĉu rekte aŭ ne sur tiuj informoj, kiuj ja grandparte koincidas kun tiuj de Jossinet.

Malgraŭ sia renegata transiro al Ido, plurajn meritojn de Beaufront sendube havas: en 1898 li fondis la elstaran revuon *L'Espérantiste* kaj la organizaĵon „Société pour la Propagation de l'Espéranto“, per kiuj estis varbitaj multaj fervoraj adeptoj. Kaj li ellaboris la unuan plenan gramatikon de Esperanto. Laŭ de Beaufront necesis prononci la Esperanto-vokalojn fermite, kio donis al la lingvo strangan, nekonvenan tonon. Ŝajnas ankaŭ, ke de Beaufront-Chevreux, kiu estis priskribata kiel tre malfacila tipo, inventis la vorton „samideano“ kaj la verdan koloron kiel simbolon de Esperanto.

Kiel flame kaj verve de Beaufront eklaboris por Esperanto, tiel arde li poste kontraŭbatalis la ideojn de Zamenhof pri la neceso de intergenta amo proklamita en Bulonjo-ĉe-maro, kie ankaŭ aliaj francoj, ĉefe Bourlet, Cart kaj Sebert, ribelis kontraŭ la *Preĝo sub la verda standardo*, kun la tendenco denunci Zamenhofon juda profeto. Zamenhof kaj la francoj... malfacila ĉapitro. Cherpillod, kiu nomas lin mitomano, kredas, ke de Beaufront, psike nestabila homo, ne povis elteni, ke elstaraj figuroj kiel Aymonier, Boirac, Bourlet, Cart, Michaux, Moch, Sebert ludis eĉ pli gravan rolon en la Esperanto-movado, dum de Beaufront mem, konsiderante sin la plej unua esperantisto de Francio, sentis sin supera al ĉiuj ceteraj.

Dum de Beaufront do komencis rifuzi la doktrinon de Zamenhof pri esperantismo kaj fine distanciĝis de la Esperanto-movado, li samtempe diskonigis novan lingvan teorion (en kiu li evidente ĉefe interesiĝis pri la vortfarado). En tio li estis helpata de Louis Couturat (1868-1914), brila franca intelektulo, filozofo kaj matematikisto-logikisto. La ĉi-lastata asociiĝis kun Léopold Leau (1868-1943), alia elstara universitata matematikisto. Kune ili verkis la elstaregan libron *Histoire de la Langue Universelle* (represita de la eldonejo Olms en 2001) kaj per tio postlasis signifan kontribuon al la historio de la ĝis tiam konataj provoj de planlingvoj. Ĉi tiuj du eminentuloj same fondis en 1901 la *Delegacion por alprenado de helplingvo internacia* okaze de la Universala Ekspozicio en Parizo por levi la aferon de la mondlingvo sur pli alta, scienca nivelo. Al tiu Delegacio aliĝis 1251 anoj de diversaj akademioj kaj fakultatoj universitataj kaj 301 societoj. Cetere kaj Couturat kaj Leau montriĝis komence tre favoraj al Esperanto. Bedaŭrinde ne ĉio iris glate kaj laŭplane. La Internacia Ligo de la Akademioj, fondita en 1900, en majo 1907 deklaris sin nekompetenta por decidi la demandon de la internacia lingvo kaj ŝovis la temon al iu speciala komitato de spertuloj, inter kiuj troviĝis ekzemple Jespersen, Baudouin de Courtenay, Schuchardt, Boirac, Ostwald, Peano k.a. (sed ne de Beaufront !). Sine de la Komitato okazis prezentoj de diversaj lingvoprojektoj, kaj ĉar Zamenhof mem ne povis partopreni tiujn kunsidojn por defendi Esperanton, li delegis de Beaufront, al kiu li evidente fidis, kio montriĝis grava eraro. Sed malfeliĉe okazis tiel, ke la Konstanta Komisiono, kiu estis delegita de la Komitato studi la planlingvan demandon, en sia unua kaj sola kunsido de la 25a de oktobro decidis alpreni „anoniman“ projekton, nomatan Ido. De Beaufront poste asertis, ke li estas la aŭtoro de tiu nova lingvo, kio estis blufado. Plej malfrue post la unua mondmilito evidentiĝis, ke la vera aŭtoro de Ido devis esti Louis Couturat mem, dum de Beaufront servis kiel pajlohomino por ludi la rolon de la judaso. Post tiuj malagrablaj okazaĵoj multaj membroj konsternite forlasis la Konstantan Komisionon. Kritikante la konduton de Couturat, Baudouin de Courtenay deklaris, ke Ido estas malpli valora ol Esperanto kaj *ne prezentas progreson sed malprogreson*. Jen la genezo de la Ido-krizo, pri kiu ĉiu esperantisto devus esti konscia por pli bone kompreni kial Esperanto venkis malgraŭ la enmiksiĝo de elstaraj lingvosciencistoj inter 1900 kaj 1907, kiuj finfine fuŝis la planlingvan aferon (similaj scenoj ripetiĝis en la 20aj jaroj en Ligo de Nacio kun Gonzague de Reynold, poste kun Occidental kaj Interlingua). Kiel pozitivan rezulton de la Ido-krizo oni povas konsideri la fondon de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en 1908, organizaĵo starigita kun socia rilato al la homa bazo. Malgraŭ la bojkoto flanke de la esperantistoj, Ido poste estis sufiĉe sukcese propagandata ĉefe de Couturat, kiu mortis en 1914, kaj de de Beaufront, kiu forpasis en 1935 kiel

mizerulo kia li ĉiam estis. La apero de la lingvo Occidental (1922) kaj la dua mondmilito esence malfortigis la Ido-movadon, kiu hodiaŭ ekzistas kiel eta resto ĉirkaŭ *Uniono por la Lingvo Internacia (ULI)*, kiu eldonas la revuon *Progreso*.¹

Kiel sciate, la idistoj propagandis la aserton, ke ilia lingvo estas en principo pli bona ol Esperanto. La dua parto de la broŝuro estas dediĉita al detala (kaj kritika) lingvistika prezento de la lingvo Ido, kun trafikaj ekzemploj. Ĉi tiu lingva analizo estas tre leginda, des pli ĉar en provo de objektiva komparo de Ido kun Esperanto la aŭtoro celis eltrovi, kio en Ido eventuale estas pli bone solvita ol en Esperanto. Kaj fakte li trovis kelkajn 'plibonigojn', ekzemple la senĉapeligon, la forigon de iuj tro artefaritaj vortoj (kio kondukis al drasta okcidentigo aŭ naturalismigo de Ido), la seksan sistemon (kun 3 seksoj), la personajn pronomojn, la verban pasivon, la prepoziciojn de/da/di, k.a. Ke Esperanto konsekvence konservis sian akuzativon, Cherpillod trovas tamen laŭdirinde, ĉar tiel Esperanto restis laŭ li pli klara kaj pli simpla. Zamenhof mem ne kontraŭis formojn kiel ,amatas', ,amitas' ktp., se la Lingva Komitato ilin aprobus (en letero al P. Corret, 1907). Malgraŭ sia artefariteco, pli „geniaj“ Cherpillod trovas ekzemple la unikajn tabelvortojn en Esperanto, dum ĉi tiu sistemo ne ekzistas en Ido. Plej malfrue ĉe la vortderivado kaj la signifo de la vortradikoj, kie Ido iris tute alian vojon ol Esperanto, konanta la principon de la kunmetado, devis okazi granda miskompreno inter Zamenhof kaj la aŭtoro(j) de Ido. Ĝuste ĉi tiu punkto distingas Esperanton de la eŭropaj lingvoj. Ĉar ne ĉio en Ido, kiu estas matematike preciza lingvo, estis malbona, Esperanto eĉ transprenis kelkajn elementojn el tiu ĉi reformlingvo, nome iujn sufiksojn kiel -enda, -ifi, -iva, -oza aŭ iujn vortojn kiel ĉipa, febla, kurta, olda, povra k.a. Tute klaras, kaj tion Cherpillod montras en la lasta ĉapitro, ke la ,mikra' Ido-literaturo neniel estas komparebla kun la ,grandioza' de Esperanto!

Pri Ido, kiun oni povus karakterizi kiel Esperanton sen homaranismo, sen ĉapeliloj kaj sen akuzativo (kvankam ia resto de ĝi tamen plu ekzistis), Cherpillod, la konvinkita esperantisto, havas jenan konkludan opinionon: „Ido havas nekonvenan nomon. Per tiu nomo, la aŭtoroj de tiu lingvo penis kredigi, ke ilia eltrovo estas la filo, la ,ido' de Esperanto. Tio subkomprenigas, ke ĉiuj esperantistoj tute nature adoptos la idon, kiel ili adoptis la patron, dudek jarojn pli frue. Lerta reklama rimedo! Lerta, sed ne efika, ĉar la esperantistoj, majoritate, ne falis en la kaptilon. Fakte, Ido ne estas la filo de Esperanto, ĉar ĝi estas bazita sur aliaj principoj, kaj ĝi ne apartenas al la sama lingva familio. La idistoj asertis ankaŭ, ke ilia lingvo estas *reformita Esperanto*. Fakte, ĝi estas *misformita Esperanto*.“ Do ekde cent jaroj idistoj kaj esperantistoj estas 'ligataj' per profunda reciproka malamo, ĉar ilian historian perfidon de 1907 la zamenhofanoj neniam povis pardoni al la idistoj.

Entute temas pri leginda publikaĵeto klare strukturita, kiu trafe resumas la eventojn antaŭ cent jaroj kaj utile donas komparan superrigardon pri la gramatiko de Ido. Mi mem sentas la mankon de aparta prezento de la grava, tre interesa kaj ne tre konata historiografia kontribuaĵo de Boris Kotzin de 1913 (kiu ja estas menciita en la bibliografio kaj kiun oni devintus reeldoni okaze de la centjariĝo de Ido), kaj de la reagoj de L.L. Zamenhof mem al la faroj de la Delegacio, kiuj estas konservataj en formo de korespondaĵoj (vd. la volumon *Por kaj kontraŭ reformoj* de ludovikito). Krom tio oni povintus menci la gravan verkon de René de Saussure *La construction logique des mots en Espéranto* (Genève 1910), kiu estis esenca kontribuaĵo por rifuzi la Ido-lingvoteorion pri vortstrukturo kaj vortfarado fare de grava lingvotioriulo, kiu poste bedaŭrinde mem decidis distanciĝi de Esperanto, por sperti pli malpli la saman sorton kiel de Beaufront kaj Couturat – nome la senkompatan kondamnon kaj striktan ignoradon fare de la esperantistoj.

© Andreas Künzli, aperis en *Esperanto* (UEA), januaro 2009 (ĉi tiu versio estis retralegita kaj ete korektita en aŭgusto 2015).

¹ Vd. <http://www.ido.li/index.php/ULI/Progreso>.